



# VALENCIA LUNO ★


Tria epoko – numero 15 – Aprilo 2021

★ Ĉu vi povas trovi la erarojn?  
Kiel korekti ilin?



*Forum* **UNESCO**  
HEADQUARTERS

University and Heritage  
Université et Patrimoine  
Universidad y Patrimonio



**DENNIS KEEFE:**  
**LA ESPERANTISTO DE LA JARO 2011**





## BULTENO DE VALENCIA ESPERANTO-GRUPO

### VALENCIA ESPERANTO-GRUPO

Av. Peris y Valero, 96, 3-a, pordo 5  
46006 VALENCIA  
Tel. 655 315 457

### LUM-RADIO

Avda. Castilla, 25, 1-a, 1-a  
46380 CHESTE (Valencia)

Redaktoro kaj kompostisto: Eduardo Alonso Navarro

Revizio: Elías Hernández Capdevila

Rimarkoj pri la bulteno kaj kunlaboroj: [valencialuno3@gmail.com](mailto:valencialuno3@gmail.com)

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## ANTAŬAJ NUMEROJ

Vi povas elŝuti niajn antaŭajn numerojn ĉe nia retejo

<https://valencia.esperanto.es/ttt/publicacions/>

# ENHAVO

- 01 KOVRILO: DENNIS KEEFE  
de Eduardo Alonso
- 04 SALUTON! -  
de Eduardo Alonso
- 05 DENNIS KEEFE  
de Vikipedio
- 07 DENNIS KEEFE: LA ESPERANTISTO DE LA JARO 2011  
de La Ondo de Esperanto
- 11 DENNIS KEEFE RICEVIS LA DIPLOMON DE  
LA ESPERANTISTO DE LA JARO  
de La Ondo de Esperanto
- 13 DENNIS KEEFE: MI FIERAS ESTI ESPERANTISTO  
Intervjuo kun Dennis Keefe, de Aleksander Korĵenkov
- 21 KIU ESTAS DENNIS KEEFE?  
de Frank Mintz, Groupe Espéranto du Maine
- 23 DENNIS EN VALENCIO  
de Elías Hernández Capdevila
- 24 ANGULO DE LA ESPERANTISTA ŜAK-LUDANTO  
de Elías Hernández Capdevila
- 27 HUMURO PER ESPERANTO (II)  
de Elías Hernández Capdevila
- 30 ĈU VI POVAS TROVI LA ERAROJN?  
KIEL KOREKTI ILIN?  
de Dennis Keefe

Foto: DENNIS KEEFE

# SALUTON!

Karaj geamikoj

Bedaŭrinde, pasintmonate ni ne povis publikigi nian kutiman Valencia Luno-numeron pro manko de kunlaboroj. Pro tio de nun ni perdas nian monatan rolon, kiu fariĝas "kiam ni havos sufiĉe da materialo".

Tamen ĉi-monate ni havas specialan numeron dediĉitan al memorfesto de la **10a datreveno de la elekto de Dennis kiel Esperantisto de la Jaro**, de la revuo La Ondo de Esperanto.

Pro tio ni reproduktas la Vikipedio-paĝon pri Dennis kaj du tiutempajn artikolojn en La Ondo de Esperanto. Poste Aleksander Korĵenkov intervjuis Dennis, ankaŭ por La Ondo de Esperanto, kaj poste Frank Mintz, de Groupe Espéranto du Maine, rakontas al ni pri Kiu estas Dennis Keefe?, kaj komentas sian prelegon ĉe la «Maison des Langues» ĉe la universitato «du Majno» en Le Mans.

Post tio, Elías rakontas al ni pri la instruista laboro de Dennis ĉe Grupo Esperanto Valencia, kaj lia kurso de Esperanto Plaĝo en Cullera.

Niaj kutimaj sekcioj daŭre estas Angulo de la Esperantista Ŝak-ludanto kaj Humuro per Esperanto, ambaŭ de Elías. Kaj ni finas per ludo verkita de Dennis mem, Ĉu vi povas trovi la erarojn? Kiel korekti ilin?

Afablajn salutojn

Eduardo Alonso



# DENNIS KEEFE

Antaŭ dek jaroj, en 2011, Dennis Keefe estis elektita Esperanto de la Jaro, de la revuo La Ondo de Esperanto. Pro tio, kaj por danki lin pro sia grandega laboro en la Valencia Esperanto Grupo, ni publikigas ĉi tiujn paĝojn.



## [Vikipedio](#)

Dennis KEEFE (naskiĝis la 17-an de junio 1951 en Bloomington, Ilinojso, Usono) estas usona esperantisto, iniciatinto de la lingvoinstrua versio de la Lingvaj Festivaloj. Li estas ankaŭ la aŭtoro de la "BEK"-kurso (la mallongigo signifas "Baza EKzercaro" aŭ "Baza Esperanto-Kursaro"), [1] kaj kreis la Valencian Metodon de lingva instruado, kiam li loĝis en Hispanio. En 2011 li proklamiĝis Esperantisto de la

Jaro laŭ la revuo La Ondo de Esperanto, pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj pro la evoluigo de la projekto "Esperanto-Insulo" en Hajnano.[2]

## **Notoj kaj referencoj**

1. ↑ retejo pri la "BEK-kurso" (esperante)

<http://www.bekkurso.info/>

2. ↑ Dennis Keefe: La Esperantisto de la Jaro 2011

<http://esperanto-ondo.ru/Ind-jaro.htm#2011-rezulto>

## **Eksteraj ligiloj**

- Dennis Keefe ĉe Twitter <https://twitter.com/DennisEKeefe>

- BEK-Kurso

<http://www.bekurso.info/>

- La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2011/12/keef/>



# **DENNIS KEEFE:**

## **LA ESPERANTISTO DE LA JARO 2011**

### **de La Ondo de Esperanto**

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010).

En ĉi tiu jaro (2011) 16 kandidatigantoj proponis 19 kandidatojn, al kiuj 15 elektantoj jene donis la voĉojn:

Dennis Keefe — 12 voĉoj

Hori Yasuo — 4 voĉoj

Peter Baláž — 3 voĉoj


Stefan MacGill, Perla Martinelli, Floréal Martorell — 2 voĉoj

Tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Dennis Keefe, 60-jara usona instruisto, nun en la universitato en Nankino (Ĉinio), internacie konata iniciatinto de Lingvaj Festivaloj, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2011 pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj pro la evoluigo de la projekto "Esperanto-Insulo" en Hajnano.



En la februara kajero de La Ondo de Esperanto aperos intervjuo kun la Esperantisto de la Jaro 2011.



Koran gratulon al Dennis Keefe!

Halina Gorecka,  
sekretario

[La Ondo de Esperanto - Decembro  
2011](#)

## **Elektokomisiono**

### **Proponantoj**

Marija Belošević (Kroatio):  
vicprezidantino de IKUE

Višnja Branković (Italio): direktoro de  
Orbis Pictus

Renato Corsetti (Italio): vic-  
prezidanto de IEF

István Ertl (Luksemburgio): tradukisto  
ĉe Eŭropa Revizora Kortumo

Judit Felszeghy (Hungario): ekssekretario de la Esperanta PEN-Centro

Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio  
Havano

Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU

Aleksander Korĵenkov (Ruslando): ĵurnalisto kaj verkisto

Lee Jung-kee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro

Vinko Markovo (Francio): ĝenerala sekretario de SAT

Bruno Masala (Francio): komitatano de IKUE

Cindy Mc Kee (Usono): reviziisto de La Karavelo kaj respondeculo de  
verkoj.com

Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto

Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro

José Antonio Vergara (Ĉilio): prezidanto de ISAE



## Elektantoj

Petr Chrdle (Ĉeĥio): direktoro de KAVA-PECH

Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE, senatano de la Esperanta Civito

Anna Jausions (Francio): prezidantino de OSIEK

Gbeglo Koffi (Togolando): administranto de la Afrika Centro Esperantista

Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM

Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko

Stano Marček (Slovakio): redaktoro de Esperanto

Tahira Masako (Japanio): estraranino de JEI, kunlaboranto de KAEM

Geraldo Mattos (Brazilo): doktoro pri lingvistiko

Stefan Maul (Germanio): eksĉefredaktoro de Monato

Sergio Pokrovskij (Ruslando): sciencisto, tradukanto, eseisto

Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): eksprezidanto de EAF

Roland Rotsaert (Belgio): kasisto de IKEF; redaktoro de Monato pri ekonomio

Martin Schäffer (Meksiko/Germanio): komitatano de UEA, sekretario de GEA

Josef Shemer (Israelo): sekretario kaj estrarano de ELI

Ljubomir Trifončovski (Bulgario): verkisto, redaktoro



## Sekretario

Halina Gorecka (Ruslando): eldonanto de *La Ondo de Esperanto*

Pliajn informojn pri la projekto La Esperantisto de la Jaro kaj intervjuojn kun ĉiuj antaŭaj laŭreatoj legu rete ĉe <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-jaro.htm>

Ĉi tiu teksto aperis en la januara kajero de La Ondo de Esperanto.

Ĉe represu bonvolu nepre indiki la fonton paperan (se en presaĵo) aŭ retan (se en retejo):

Papere: La Ondo de Esperanto, 2012, N<sup>o</sup>1 (207).

Rete: La Balta Ondo <https://sezonoj.ru/2011/12/keef/>

## **Respondoj al *Dennis Keefe – la Esperantisto de la Jaro 2011***

### **1. José Antonio Vergara diras:**

19 Decembro 2011 je 02:17

Varman gratulon al Dennis! Li ja meritas honoron tian, ĉar serioza, realisma kaj strategie konscia aktivulo por Esperanto.



### **2. [Katalin Kovats](#) diras:**

18 Decembro 2011 je 13:38

Mi kore gratulas Dennis kaj kun feliĉo transdonas la torĉon al kolego, meritinta la distingon. Dennis, feliĉu kaj sciu, ke esti LA ESPERANTISTO DE LA JARO estas honoro, mi ĝuis tiun statuson.

Mi aparte ĝojas, ke la komisiono elektis denove aktivulon de la movado, kiu estas pedagogo, kiu okupiĝas pri instruado de la lingvo. Tio montras la gravecon de nia agado.

Aparta ĝojo estas por mi, ke post unu

monato ni kune povos labori ankaŭ fizike sur la Esperanto-Insulo kaj mi promesas al vi ke ni pretigos feston je via honoro.

Havu multe da energio kaj bonan sanon, feliĉon en viaj agado kaj persona vivo.

Amike, Katalin Kovats

# **DENNIS KEEFE RICEVIS LA DIPLOMON DE LA ESPERANTISTO DE LA JARO de La Ondo de Esperanto**

La 11an de januaro en Hajnano (Ĉinio) okazis la oficiala malfermo de la kursaro, organizita kadre de la projekto Esperanto-Insulo. Al la tutmonata programo aliĝis 110 personoj el 23 landoj. Iom pli ol la duonon konsistigas 60 ĉinoj, plejparte studentoj, kiuj kun kelkaj mongolaj samkursanoj estas stipendiataj por tage 8 horojn lerni la internacian lingvon dum 4 semajnoj.

La partoprenon de tiuj ĉi junuloj ebligis la volontula laboro kaj subteno de la kvar instruistoj kaj grandnombra partoprenantaro el Eŭropo kaj kelkaj alikontinentaj kursanoj.



La ĉefa kursaro de la komencantoj estas gvidata de Dennis Keefe, laŭ lia fama BEK-metodo kaj observata kaj helpata de trideko da partoprenantoj de la pedagogia seminario, kiun Katalin Kováts gvidos. Unu el la ĉefaj taskoj de la kursaro pri metodiko estas ĝuste lerni multon pri tiu ĉi metodo kaj aktive

helpi kaj dumkurse kaj eksterklase al la novlernintoj praktiki la lingvon kaj havi komunikadspertojn.

Krom la komencantoj, la aliaj ĉeestantoj havas la eblon frekventi tiujn kursojn aŭ elekti unu el la universitataj kursoj: "Alfronti militon" de Ronald Glossop (Usono): kaj "Filozofio kaj historio de informatiko" de Frederico Gobbo (Italio).

Dum la malferma ceremonio, matene la 11an de januaro oni laŭtlegis la gratulmesaĝojn, inter ili tiujn de Stefan MaGill, Renato Corsetti kaj de la estroj de la landaj sekcioj de ILEI el Germanio, Svislando, Koreio.

Fine de tiu malfermo, surprize por la lanĉinto de la ideo Espertanto-Insulo, estis anoncita grava novaĵo. Katalin Kováts, kiel kuriero de La Ondo de Esperanto, transdonis la diplomon al la novelektita Esperantisto de la Jaro 2011 Dennis Keefe. La aranĝo estis pluroble interesa kaj simbola, ĉar Dennis Keefe ricevis sian distingon rekte el la manoj de sia antaŭulino, la Esperantisto de la Jaro 2010, kaj kadre de ĝuste tiu aranĝo por kiu Dennis estis premiita.

La kursaro funkcios ĝis la 12a de februaro.

Vidu filmeton pri la evento.

<http://www.ipernity.com/doc/edukado.net/12040348>

[La Ondo de Esperanto - Januaro 2012](#)

# DENNIS KEEFE:

## MI FIERAS ESTI ESPERANTISTO

### Intervjuo kun Dennis Keefe, la Esperantisto de la Jaro 2011, de Aleksander Korĵenkov

Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Kiam mi eksciis, ke mi iĝis [la Esperantisto de la Jaro](#), mi kortuŝiĝis kaj pensis pri mia familio, fakte. Pri mia iam kvinjara filo, Nikolo, kun kiu mi ludadis korbopilkon en Esperanto, kaj pri mia iam sesjara filino, Maria-Helena, kiu ĉiam faris siajn BEK-ekzercojn, ĉar ĉe la fino mi donis al ŝi peceton da ĉokolado.

Mi pensis pri la familio, ĉar kvankam ke ili bone akceptis mian esperantistecon, ili pensis, ke mi estis eble tro idealista, kaj ke mi devis koncentriĝi pli pri mia kariero ĉe la komerca lernejo HEC en Parizo. La konkreta anonco pri tiu premio ne estis, tamen, tute surpriza. Ekaperis antaŭsignoj: homoj kiuj mesaĝe diris, ke ili proponis min por enlistiĝo; demandoj pri tio aŭ alio por enmeto en artikolon de La Ondo de Esperanto, ktp. Tamen mi pensis, ke ĉio ĉi estis rutino por ĉiuj enlistanoj, mi ne tiumomente kredis, ke homoj plejparte voĉdonos al mi por tia premio.



## **Vi estas internacie konata kiel la inventinto de la Lingvaj Festivaloj. Bonvolu rakonti.**

Mi kreis Lingvajn Festivalojn en la urbo Tours de Francujo en la jaro 1995. Jam en la unua jaro prezentiĝis 32 lingvoj en mallongaj kursetoj de 40 minutoj. En la posta jaro estis 65 lingvoj, kaj en la tria jaro estis 85 lingvoj kun proksimume 250 kursetoj. La reago de la amaskomunikiloj estis profunda, speciale ĉe radio kaj televido. En la tria jaro estis multaj eble ĝis 15 radiaj kaj televidaj programeroj pri la Lingva Festivalo, inkluzive almenaŭ du tutlandajn televiderojn. Eble ne miloj sed milionoj da homoj aŭdis pri Esperanto pro tiuj festivaloj.

Mi lanĉis Lingvajn Festivalojn en Usono kaj Ĉinujo kun similaj rezultoj. Mia ununura festivalo en Usono, ĉe la Universitato de Ilinojso, 65 lingvoj kun 150 kursetoj, estis vaste komentita de la loka televido kaj gazetaro. En Ĉinujo, la Universitato de Nankino akceptis mian planon por starigi Lingvan Festivalon kiel eventon en la Internacia Jaro de Lingvoj de Unesko, kaj laŭ la raporto de Unesko pri tiu jaro, verŝajne la Nankina Festivalo estis la plej ampleksa prezentado de lingvoj en la tuta mondo tiujare: 67 lingvoj, 256 kursetoj kaj pli ol 13 mil 500 ĉeestantoj en la kursetoj. La kurso de Esperanto ĉeestiĝis de ĉirkaŭ 1450 homoj, kaj el ili 225 ĉeestis postajn kursojn de Esperanto. Rekordo, almenaŭ en Ĉinujo. La gazetara reago, kiu ofte prezentis Esperanton estas simile vasta: naŭ ĵurnalaj artikoloj kaj kvin televidaj programeroj. La Ĉina internacia novaĵ-agentejo Xinhua ankaŭ disvastigis raportojn kaj fotojn internacien.

La populara akcepto de Lingvaj Festivaloj, la potenco favore prezenti Esperanton al neesperantistoj indikas, ke la Festivaloj povas okupi fortan strategian rolon en la disvastigo de Esperanto. Laŭ mi, Lingva Festivalo estas ideala projekto por ĉiuj Universalaj Kongresoj, kaj mi kaj Gian Carlo Figliera prezentis ĝin tiel ĉe UEA en Roterdamo antaŭ multe da jaroj, sed ĝis nun, kvankam kun forta aprobo de José Antonio Vergara, la ideo ne sukcese survojiĝas. Bedaŭrinde, ĉar Lingva Festivalo, kun Esperanto kiel sponsoro, indikas, ke Esperanto estas la amiko de ĉiuj lingvoj. Kaj Lingva Festivalo estas konkreta monstro al la publiko, ne filozofaj vortoj kiuj perdiĝas sur la papero de filozofa verkisteto.

## **Nekredebla laboro! Kaj ĝi ne estas la sola, pro kiu vi iĝis la “heroo de la jaro” en Esperantujo. La internacia elektokomisiono aparte emfazis vian instruadon, interalie, en Ĉinio.**

Mi estas unu el la multaj homoj kiuj dum tre longa tempo provadis instrui Esperanton. Mi kursogvidis en, unue, Hispanio, poste Francujo, Usono, Japanio kaj nun Ĉinujo. Kelkaj lokoj estas konataj: Liceo de Esperanto en Madrido, Grésillon kaj Plouezek en Francujo, NASK en San-Francisko kaj Oomoto en Japanio. Aliaj lokoj estas malpli konataj. kiaj iu kaŝita monaĥejo Duobao Si en Ĉinujo aŭ kursoj en la urbeto Lunay en Francujo. Lastjare en Ĉinujo mi instruis Esperanton pli ol 300 horojn, kaj triono estis en oficialaj programoj ĉe la universitato.

## **Vi ja instruas Esperanton en tuta aparta maniero. Bonvolu rakonti pri tio.**

La ĉefa trajto de miaj kursoj estas, ke ili estas tre netradiciaj. Ekzemple, la daŭro de mia vintra, feria kurso en Ĉinujo estas pli ol 200 horoj. Kelkaj el miaj kursoj estas tre intensaj, ĝis ok horoj ĉiutage. Mi ne instruas la sufiksojn kaj prefiksojn, sed lasas la lernadon de ili por hejmsstudado per mia libro NESPO. Mi tute ne komencas la instruadon per prononcado, kaj fakte ne instruas la prononcadon rekte. Eble la plej netradicia parto de mia kurso estas, ke mi instruas ege malmulte, kaj lasas ĝis 90% de la tuta tempo por praktikado en malgrandaj grupetoj, sen instruisto. Mi kreis du kursojn: BEK kaj PEPAS, kaj unu metodon: la Valencian Metodon. Iom post iom mi enretigas ĉiujn miajn ekzercojn de Esperanto ĉe [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info). Nun tie troviĝas eble 500 paĝoj da materialo. Sed mi devas konfesi al vi, ke mi ankoraŭ ne bone komprenas kiel fari bonan kompletan kurson, nek mallongan kurson. La problemo eble kuŝiĝas en la paradokso de lingvolernado: facile oni povas priskribi la gramatikon de Esperanto, eĉ al ĉinoj, tamen krei fluajn parolantojn kiuj bone memoras kaj utiligas la vortojn, tio estas alia afero.

## **Kaj kio estas la Esperanto-Insulo?**

Esperanto-Insulo estas nova projekto kiun mi skizis por la ĉinaj esperantistoj antaŭ preskaŭ du jaroj, kiam mi instruis Esperanton sur la insulo Hai Nan Dao, aŭ Hajnano. Mi verkis raporton rekomendante, ke la loka asocio tie kaj la ĉinaj esperantistoj starigu servo-centron por aziaj kaj eŭropaj esperantistoj.

Tion ilin nun volas fari, kaj inter la 12a de januaro kaj la 13a de februaro 2012 ekestiĝos la unua internacia Esperanto-Insulo, kun pli ol 110 gelernantoj el eble 24 landoj. Detala informo pri Esperanto-Insulo troviĝas ĉe [www.esperanto-insulo.info](http://www.esperanto-insulo.info).

## **La Esperanto-Insula programo evoluos paralele laŭ tri direktoj: BEK-kurso por komencantoj, metodika seminario por instruistoj, kaj Universitato de Esperanto. Kio ĝi estas?.. Ĉu io simila al AIS?**

Ne tiel simila al AIS, mi sekvas grandparte la modelon de la Universitato de Berkeley kaj de Yale. Mi nun klopodas starigi la Universitaton de Esperanto kune kun profesoroj Ron Glossop kaj Federico Gobbo. Tiu projekto tre diferenciĝas de tiu de AIS pro multaj kialoj. Unue, la kursoj estas nur tiuj kursoj, kiuj jam instruiĝis en normalaj universitatoj. Due, ĉiu kurso daŭras 40 horojn proksimume, Tria, la kursoj estas bazaj kaj sufiĉe ĝeneralaj por, ke ĉiuj normalaj universitatanoj povu ĉeesti ilin. La kursoj estos filmitaj kaj estos videblaj en la Interreto, kaj poste estos ĉies propraĵo laŭ la principoj de Kreiva Komunumo. La unuaj kursoj okazos en Esperanto-Insulo, sed ili estas sendependaj de tiu insulo, kaj venontece povas okazi ie ajn. Mi fakte, ne bone komprenas la modelon de AIS. Kiel dirite, la modelo Universitato de Esperanto pli baziĝas sur la modelo de la Universitato de Yale kies kursoj videblas ĉe [oyc.yale.edu](http://oyc.yale.edu). Rigardu ĉe Yale kiaj estas la kursoj, kaj vi bone kaj rapide komprenos, kiaj, mi kredas, povas esti la kursoj de la Universitato de Esperanto.

## **Ĉu vi ricevas helpon de Esperanto-asocioj, edukejoj kaj klerigejoj por realigo de viaj projektoj?**

Jes kaj ne. Jes, en la senco, ke multe da esperantistoj helpis al mi starigi projektojn diversloke: la lokaj asocioj de Madrido kaj de Valencio en Hispanujo permesis al mi starigi eksperimentajn kursojn kaj de tiaj kursoj naskiĝis BEK. El la ok homoj kiuj kunlaboris por estri la unuan Lingvan Festivalon en Tours, sep estis esperantistoj. Esperanto-Insulo estas nur mia ideo plibonigi la ideojn de la ĉinoj, ekzemple Arko, Trigo kaj Trezoro, fari efikajn, internaciajn, vintrajn kursojn, enĉinuje nomataj VEK. La Universitato de Esperanto estas klopodo popularigi la kompleksajn ideojn de AIS, do la ideo mem devenas de Helmar Frank kaj aliaj esperantistoj. Ekster Esperantujo



estis la forta apogo de la Universitato de Nankino en Ĉinujo, kaj la helpo de la Universitato de Ilinojso en Usono.

Sed, ĝis nun mi mem, plejparte el mia propra poŝo financis la starigon de BEK, de la Lingvaj Festivaloj, de la Esperanto-Insulo kaj de la Universitato de Esperanto. Sed diri tion ne estas diri, ke mi forte finance apogis tiujn agadojn. Tute ne. Ĉiuj el tiuj agadoj starigeblas aŭ sen mono aŭ preskaŭ tute sen mono. Tiuj projektoj ne bezonas monon. Punkto. La grandaj Lingvaj Festivaloj de Francujo kaj de Usono kostis al mi eble 300 eŭrojn entute, kaj pensu ke tiuj tri jaroj de Festivaloj estigis eble ĝis 6 televidajn programerojn, du el ili tutlandaj, kaj eble 15 radiajn programerojn, kaj kelkaj el ili regione kaj tutlande. En la lasta Lingva Festivalo de Ĉinujo estis pli ol 250 instruantoj kaj 400 kursetoj, kaj ĉiuj instruis tiujn kursojn volontule (la kosto mem de la starigo estas ege malalta, tamen la Universitato utiligis multe da mono por reklami pri ĝi). Por BEK, mi devas pagi eble 30 eŭrojn ĉiujare por havi mian retejon [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info). Estas nenia subvencio por la Esperanto-Insulo kaj la Universitato de Esperanto. La ŝlosilo estas trovi senpagajn klasĉambrojn, kaj fari agadojn kiuj ege interesas al la partoprenantoj kaj volontuloj. Piednote, post kiam mi forlasis Francujon en 1997, kaj poste la lokanoj estris la Lingvan Festivalon tie, ili komencis ricevi grandajn subvenciojn de la loka registaro (iom ĉar TF1 kaj la bone konata ĵurnalistino Claire Chazal famigis la trian Lingvan Festivalon de 1997). Subite estis du Festivaloj ĉiujare kun subvencioj de miloj da eŭroj (eble pli ol 20 mil en la unuaj jaroj). Mi tre bedaŭras tion, ĉar fakte, oni ne bezonas monon por starigi Lingvan Festivalon; oni ne bezonas luksaĉojn. Sed tion ĝis nun multe da homoj ne bone komprenas.

### **Sed vi ja okupiĝas ne nur pri Esperanto-projektoj...**

Mia profesia vivo inkluzivas laboron kiel estro de produktado ĉe fabriko, merkaticisto kaj vendisto ĉe IBM, estro de multaj universitataj programoj en Usono, Francujo kaj nun Ĉinujo. Mia instrua laboro inkluzivis kursgvidadon ĉe la Universitaton de Ilinojso, École Polytechnique en Francujo, HEC ankaŭ en Francujo kaj konsiderata kiel la unuaranga komerca lernejo de Eŭropo (laŭ Financial Times). Mia specialaĵo estas instruado de merkatico kaj strategio. Mi instruis la anglan lingvon ĉe Berlitz en Madrido antaŭ 30 jaroj, Mi

havas du dujarajn magistrajn diplomojn: unu pri komerco, MBA, kaj unu pri lingvo-Instruado, ambaŭ ĉe la Universitato de Ilinojso. Kvankam mi neniam studis lingvojn antaŭ la aĝo de 25 jaroj, mi nun flue parolas kvin: la hispanan, la francan, la germanan, Esperanton kaj la anglan. Mi ankaŭ parolas kaj skribas ĉine, tamen nur ĉe tre baza nivelo.



*Dennis Keefe instruas*

Eble la plej granda honoro de mia vivo estas, ke mi gajnis la Konkurson pri Vortoj ĉe la Universitato de Arizono, kaj havas la rekordon por la 50 jaroj de la konkurso. Eble tiu rekordo ankoraŭ staras; mi ne scias. Eble vi jam divenis mian ŝatokupon: legi vortarojn!

**Legante la Esperantan gazetaron kaj la ret-diskutojn, oni ofte miras pro la amatoreco de la esperantistaro kaj pro la tro malnovaj manieroj de lingvo-disvastigo, dum pluraj movadoj kaj sociaj grupoj sukcesis krei pri si pli pozitivajn imagojn ol la esperantistoj. Ĉu vi havas ideojn pri la kaŭzoj de la relativa stagnado de la esperantistaro?**

Vi ĵus tuŝis unu el miaj plej ŝatataj diskuttemoj en Esperantujo, kaj estas vasta listo de kialoj pro kiuj la Esperanto-Movado nuntempe stagnas, sed ne

estas la kulpo de la esperantistoj mem. Unu el la ĉefaj obstakloj bone klariĝas de la teorio de Everett Rogers pri la Etendiĝo aŭ Difuzado de Novaj Ideoj (Ideo povas esti koncepto, industria varo, alt-teknologia kreaĵo, ktp.) Unu el la bazaj nocioj de tiu teorio estas, ke la homoj kiuj unue akceptas novan ideon malsimilas al aliaj homoj kiuj eventuale poste akceptos la saman ideon. Fakte, estas kvin grupoj aŭ segmentoj menciitaj de Rogers: la unua grupo, novigantoj (innovators), estas nur 2.5% el la socio, kaj por disvastigi novan ideon, unue oni devas konvinki tiun grupon. Posta grupo, fruaj akceptantoj (early adopters), reprezentas 13.5% el la socio, kaj la posta grupo, frua plimulto (early majority) inkluzivas 34%.

Ne estas spaco ĉi tie por bone klarigi, kiamaniere tiu sistemo funkcias, sed la ĉefa eraro de la esperantistoj, kaj mi mem faras tian eraron, estas ke ni utiligas multe da tempo kaj inko por konvinki la vastan publikon pri la boneco de Esperanto, dum Rogers kaj ni scias, ke fakte, tiu plimulto neniam akceptos Esperanton se ili ne vidas, unue, homojn kiuj jam utiligas ĝin, kaj tiuj unuaj homoj apartenas al tiu unua malgranda grupo. Ni havos multe malpli da kapdoloroj se ni dediĉos nin al la varbado de nur tiuj novigantoj unue, kaj post kiam tiuj homoj akceptos kaj uzos Esperanton, ni povos transiri al aliaj celgrupoj.

### **Kion vi pensas pri la projekto mem Esperantisto de la Jaro?**

Mi tre tre ĝojas ricevi tiun premion, ĉar mi pensas, ke Esperanto estas granda parto de mia vivo kaj mi ege fieras esti esperantisto. En ĉiuj el miaj kursoj ĉe la universitatoj en Francujo, Usono, kaj en Ĉinujo, mi ĉiam parolas volonte pri Esperanto al miaj studentoj. Tamen, mi ne pensas, ke mia ricevo de la premio helpas tiom al la Esperanto-Movado. Pli gravas aliaj individuoj kaj speciale motivigitaj teamoj. Mi ĝojas se ili sukcesas. Mia laboro estas sukcesigi ilin kaj iliajn ideojn. Mi ĝojas kiam ili povas fari tion kion ili volas. Bezonatas premioj por teama laboro, sed ke tiu teama laboro estu vere mezurebla kaj utila kaj eble nova. Se mi donus premiojn, ne estus al homoj kiaj mi, sed al tiaj homoj. Mi ankaŭ kredas, ke la bonaj verkistoj de Esperanto bezonas pli da atento. Mi bedaŭras, ke mi ne talentas por esti verkisto, sed mi ĉiam kredas, ke la verkistoj estas ĉe la kerno de la eventuala sukceso de Esperanto.

## **Ĉiu laŭreato respondas al du tradiciaj demandoj. Unue: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus al neloĝata insulo (ne al Hajnano)?**

Antaŭ ĉio, PIV aŭ NPIV. Ĉiam estas ĝuo legi tiun vortaron! Due, Don Kiĥoto. Plezuro. Kaj trie, mi kunprenos unu el la klasikaj libroj de Ĉinujo tradukita de Laulum. Mi jam legis la Romanon de la Tri Regnoj, kiu estas unu el la kvar grandaj ĉinaj klasikaĵoj. Do eble mi prenu la libron Ruĝdoma Sonĝo, ĉar la rakonto lokiĝis en Nankino, kie mi nun loĝas.

## **Due, pri viaj planoj, kompreneble, post la Esperanto-Insulo...**

Krom plimaturigi BEK, longdaŭrigi Esperanto-Insulon, oficialigi la Universitaton de Esperanto, kaj plidisvastigi Lingvajn Festivalojn, al mi plaĉus kunlabori kun projektoj por starigi novan virtualan Bibliotekon de Esperanto (kun homoj ĉe la kerno kaj estrado), krei mezurado-sistemon por Esperantaj agadoj, kaj krei veran dialogon pri strategio kaj Esperanto. Mi jam antaŭe de tempo al tempo menciis tiajn temojn en la retdiskuto-listoj kaj en [Libera Folio](#), tamen tiaj mesaĝoj perdiĝas en amaso de komentoj pri lingvaj fenomenoj, kritikoj de aliaj esperantistoj kaj alispecaj ekstertemaj komentoj. Estas tre probable, ke la plejparto de la bonaj Esperantaj strategioj kuŝas nekonataj, sed malkovrindaj, kaj tiuj strategioj ne ekvideblos sen la kunlaboro kaj teama interkonsento de multaj esperantistoj kiuj ne pensas same aŭ eĉ simile. Kaj antaŭ ĉio, eksperimentoj en diversaj landoj gravas por starigi sukcesajn strategiojn. Mi mem ne scias kion fari, sed se aliaj eksperimentas, ni komencos lerni, kaj mia revo estus, ke la movadestroj de Esperanto permesos al la movadanoj iĝu parto de granda lernanta organizo (vidu tiurilate la verkadon de Peter Senge de la universitato MIT).

## **Ke viaj planoj realiĝu!**

Intervjuis Aleksander Korĵenkov

Ĝi estas intervjuo el la februara kajero de La Ondo de Esperanto (2012).

Ĉe represo bonvolu nepre indiki la fonton paperan (se en presaĵo) aŭ retan (se en retejo):

Papere: La Ondo de Esperanto, 2012, N<sup>o</sup>2.

Rete: La Balta Ondo <https://sezonoj.ru/2012/01/208keefe/>

# KIU ESTAS DENNIS KEEFE?

**de Frank Mintz, Groupe Espéranto du Maine**

Dennis Keefe estis elektita kiel la Esperantisto de la Jaro 2011, laŭ la revuo La Ondo de Esperanto, pro la universitat-nivela disvastigo de Esperanto en Ĉinio. Cetere, li verkis la BEK-on kiu signifas "Baza EKzercaro" aŭ "Baza Esperanto-Kursaro". Plie, Dennis Keefe organizis "Lingva Festivalo"-n por montri la strukturojn de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj. Pro tiaj trajtoj de la esperantista sperto de Dennis Keefe la grupo GEM povis ekveki la intereson de Pierre Salam, direktoro de la domo de lingvoj « Maison des langues » en la universitato « du Maine » en Le Mans. Li akceptis afable inviti Dennis Keefe por ke li prezentu Esperanton al kelkaj studentoj.

Finfine, Dennis Keefe faris france prezentadon de Esperanto direktitan al la studentoj. Fakte, proksimume 25 fremdaj studentoj, kiuj lernas la francan lingvon en la domo de lingvoj, aŭdis la prelegon.

Profitante de la ĉeesto de pluraj ĉinaj gestudentoj kaj de sia propra travivo en la Nankina universitato, Dennis Keefe starigis la problemon de interkomunikado en Ĉinio. Li diris, ke en la urbo Nankino, kie li laboris, multaj homoj ne komprenas la oficialan mandarenan lingvon. Dennis Keefe saĝe ne aludis la lingvan politikon de la komunista partio kiu elektis la mandarenan lingvon, sed li sugestis la intereson de Esperanto kiel neŭtrala lingvo por interparoli libere kaj sen hierarkiaj premoj de iu teorie grava lingvo rilate aliajn malsuperajn.

Tio estas nur unu aspekto de la prelego de Keefe, sed mi opinias, ke la psikologiaj lingvaj bremsoj ekzistas, eĉ persistas, laŭ sociaj situacioj, aŭ bezonas esti en nia konscienco. Ekzemple, antaŭ deko da tagoj estis la 75a datreveno de la libero de la nazia lagero Auschwitz en Pollando. Iu juda postvivantino, kiu lernis la germanan lingvon en sia hebrea familio, klarigis, ke ĝis nun ŝi ne povas (pro mensaj motivoj) paroli germane kun germanoj,

sed nur angle. Tre normala estas tiu sinteno : elekti germanan lingvon signifas (pro tio) agnoski al nazismo statuton de oficiala homa ideologio, kiun ŝi nek povas nek devas akcepti.

Alia problemo aperas ĉar ĝi supozas, ke en si mem oni havas sufiĉe da morala distanco kaj persona ebleco por superi siajn antaŭjuĝojn. Tiam oni devas agnoski, ke en iu ajn socio, iu ajn lingvo ekzistas kritikaj tendencoj, kiuj donas okazojn por nuanci kaj elmontri novajn starpunktojn.

Speciale pri la nazismo, en kaj ekster Germanio, eĉ ekde la komenco de tiu socia degenero, la germanoj de pluraj tendencoj sturmis voĉe kaj armile kontraŭ la musolina faŝismo (sen rasa deliro) kaj nazismo (faŝismo kun rasteorio). Tamen, rilate la kontraŭstaron al la kolonialismo ŝajne malaperita en Afriko kaj norda aŭ suda Ameriko, mi bedaŭras, ke la franca kaj la angla lingvo servas por unuigi landojn, kiuj vivis sub la olda kaj la moderna kolonia jugo (vidu la francan armeon en Mali kaj en aliaj landoj aŭ la kanadan transnacionan entreprenon Barrick Gold en Ameriko aŭ en aliaj kontinentoj).

Por reveni al la okazo de la rifuzo paroli germane de la hebrea postvivantino:

- la angla kaj hispana kolonialisma genocido de amerikanaj originaj popoloj;
- la afrika-franca kolonialisma ekspluato;
- (kun ambaŭ neforgesema spuro ĝis nun) morale kaj politike (eĉ en la vundita haŭto), malpermesas uzi dum interŝanĝoj la anglan kaj hispanan lingvojn! Cetere, ili ne povas speguli la afrika-amerikan originan popolan kulturon nek vortojn kunspinantajn teron, naturon, faŭnon, ktp. Evidente, la problemo estos elekti iun unuigitan lingvon inter dudeko, (kial ne Esperanton?), aŭ uzi alternative du lingvojn ĉiujn 5 jarojn. La solvo koncernos la afrikajn kaj amerikajn etnojn, kiuj nepre devus pripensi la necesajn rimedojn.

Frank Mintz

Groupe Espéranto du Maine

<http://esperantolemans.org/IMG/pdf/83.pdf>

# DENNIS EN VALENCIO

## de Elías Hernández Capdevila

Dek (dek!!) jaroj jam pasis ekde la momento kiam la revuo La Ondo de Esperanto decidis nomumi nian kunulon Dennis kiel Esperantisto de la Jaro 2011.

Tiu-momente, en Valencio, oni jam konis Dennis, ĉar li partoprenis kiel instruisto ĉe nia Grupo multe da jaroj antaŭe, kiam li laboris en valencia lernejo instruante la anglan lingvon. Liaj tiamaj lernantoj en nia Grupo, Pascual Pont, Ramón Diago, Pepe Anyó, ..., ricevis tiun novaĵon kun granda feliĉo, ĉar ili rememoris tiujn bonegajn momentojn spertitajn kun Dennis.

La kialo de tiu decido de la revuo estis la disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj la grava projekto Esperanto Insulo. Oni povas rimarki la gravecon de tiu posteno rigardante aliajn Esperantistojn de la Jaro: William Auld!!! en 1998, Ilona Koutny!!! en 2008, Katalin Kovats!!! en 2010, ...

Ok jarojn poste li revenis al Valencio, jam kiel emeritulo, aĉetis domon en Kujera kie li nun loĝas, kaj reprenis siajn taskojn por la lingvo ĉe nia Grupo. Dum la jaro 2019 li lanĉis la projekton Esperanto Plaĝo, kie areto da eksterlandaj lernantoj (ni ĉiuj rememoras sron. Lee el Ĉinio, Vigla el Koreio kaj Arta el Japanio) restis dum du monatoj en Kujera lernante la lingvon kaj partoprenante je ĉiuj eventoj okazintaj en nia Grupo.

Bedaŭrinde, tiu projekto ne povis daŭrigi sian laboron dum 2020 pro la pandemio, nek ĉi-jare, kompreneble. Sed Dennis ne perdas la esperon reaktivigi tiun gravan eventon.

Nune, Dennis gvidas du aliajn gravajn projektojn, Bek-kurso (marde vespere) kaj disvastigado de la Esperanto traduko de la mond-fama verko Don Kiĥote (vendrede post-tagmeze).

Lia partopreno en tiuj eventoj devas esti por ni grandega honoro, ĉar ne ĉiam oni havas kiel instruanton aŭ kiel kun-partoprenanton unu Esperantiston de la Jaro.

Elías Hernández Capdevila


# ANGULO DE LA ESPERANTISTA ŜAK-LUDANTO

de Elías Hernández Capdevila

Kaj jen la ĉiu-monata artikolo pri du facilaj ŝak-matoj, atingitaj per nur unu movo de blanka peco. Tiu ŝak-mato povus esti atingita per iu ajn peco, do, per **damo**, **turo**, **kuriero**, **ĉevalo** aŭ **peono**. Komprenoble, mi montras ankaŭ la solvon ĉe ĉiu ŝak-mato. Bonvolu provi ne rigardi la solvon ĝis post du da minutetoj.

Por faciligi al vi tiun taskon, mi ripetas necesan klarigon, pri la ĉefaj menciindaj ideoj pri tiu mirinda sporto-scienca:


La ŝak-tabulo aspektas tiel, kun pecoj (maldekstre) kaj sen ili, tute malplena:



Jen la diversaj pecoj. La pecoj moviĝas kaj samtempe ekkaptas tiel:

- **reĝo**: po unu ĉelo ĉiu-foje, en libervola direkto (vertikale, horizontale aŭ diagonale, kaj antaŭen kaj malantaŭen). Angle KING, france ROI, valencie REI kaj hispane REY.
- **turo**: laŭlonge de vicoj kaj kolumnoj (ĉe ŝak-lukto ĉiu kolono nomiĝas kolumno). Komence, estas du turoj por ĉiu ludanto sur la ŝak-tabulo. Angle ROOK, france TOUR, valencie TORRE kaj hispane TORRE.





- **kuriero**: laŭlonge de la diagonaloj. Estas ankaŭ du kurieroj sur la ŝak-tabulo por ĉiu ludanto, unu moviĝanta sur blankaj ĉeloj, la alia sur nigraj ĉeloj. Angle BISHOP, france FOU, valencie ALFIL kaj hispane ALFIL.
- **damo**: laŭlonge de vicoj, kolumnoj kaj diagonaloj. Oni povas diri ke tiu peco kapablas agi kiel turo kaj kiel kuriero, samtempe. Sed atentu: la damo ne povas agi kiel la ĉevalo ... do, ne forgesu ĉi-tiun ne-kapablon ... Angle QUEEN, france DAME, valencie DAMA kaj hispane DAMA.
- **ĉevalo**: per saltoj laŭ la litero L (du ĉeloj rekten kaj unu flanken, aŭ unu ĉelo rekten kaj du flanken). Ĝi povas transalti kaj siajn proprajn pecojn kaj la pecojn de la alia ludanto. Ĝi estas eble la plej ŝatata peco kiu staras sur la tabulo, ĉar oni povas duoblo-ataki aliajn kontraŭajn pecojn pli facile ol per kuriero, turo, damo, peono aŭ eĉ la reĝo ... Komence estas du ĉevaloj sur la ŝak-tabulo por ĉiu ludanto. Angle KNIGHT, france CAVALIER, valencie CAVALL kaj hispane CABALLO.
- **peono**: je unu ĉelo antaŭen, neniam mal-antaŭen, se tiu ĉi ĉelo estas vaka aŭ malplena (se la peono estas ankoraŭ en la baza pozicio, ĝi povas transmoviĝi je du ĉeloj antaŭen, se ambaŭ ĉeloj estas vakaj aŭ malplenaj). Plie ĝi povas preni aŭ ekkapti pecon de la alia ludanto, kiu estas sur diagonale najbara ĉelo staranta antaŭ la peono. Komence estas ok peonoj por ĉiu ludanto. Angle PAWN, france PION, valencie PEÓ kaj hispane PEÓN.

La ŜAK-LUDO estas rigardata kaj konsiderata de la UNESKO kiel SCIENCO kaj SPORTO, samtempe, kaj tiu Institucio rekomendas vigle ties uzadon kaj diskonigon per mez-lernejoj en la tuta mondo.

Kaj jen niaj du ĉi-monataj ŝak-matoj (rememoru: oni povas atingi ĉiun ŝakmaton per nur unu movo de blanka peco). Kvankam eble vi ne konvinkiĝos, ludi ŝak-ludon, aŭ almenaŭ provi solvi malgrandajn problemetojn, kiel tiujn kiujn mi montras al vi, estas eksterordinara ekzerco por via menso kaj por via kapablo koncentriĝi:

Havu kuraĝon, kaj provu solvi la du problemetojn!

	<p><b>SOLVO:</b> ĉi tiu problemo estas tre facile solvebla, ĉar sufiĉas ke la blanka peono kiu momente staras ĉe la ĉelo e6 supreniru ĝis la ĉelo e7, ŝakigante la nigran reĝon ...</p>
	<p><b>SOLVO:</b> la blanka ĉevalo kiu staras sur la ĉelo g4 saltas sur la ĉelo h6, ŝakigante la nigran reĝon ...</p>

Elías Hernández Capdevila

# HUMURO PER ESPERANTO (II)

de Elías Hernández Capdevila

Ĉi-monate mi daŭrigas alian novan eron de la revuo: HUMURO per ESPERANTO, celante publikigi amason da ŝercoj tradukitaj al nia mirinda lingvo, por ke niaj legantoj povu rimarki ke Esperanto estas lingvo tute taŭga por ĉiuj celoj, ne nur seriozaj celoj sed ankaŭ, kaj kial ne, ŝercaj aŭ humurplenaj aferoj. Se oni volas ke nia lingvo estu taŭga komunikilo, ni devus uzi ĝin je ĝia tuta amplekso.

Do, mi pretigos ĉiu-monate kelkajn simplajn ŝercojn, tradukitajn per facila Esperanto kaj tre facile kompreneblaj. Ĉi-tiu ero de nia revuo ne celas aperigi komplikajn kaj tro longajn ŝercojn, sed tute kontraŭe, simplajn kaj mallongajn ridindaĵojn ... aŭ almenaŭ ridetindaĵojn. Tio signifas ke, se vi ne emas ridegi, eĉ ne nur ridi, almenaŭ vi povos rideti.



**FINFINE, VIA PATRO EKHAVIS MUSON, KIEL VI DIRIS  
AL LI. NUN, BONVOLU KLARIGI AL NI KION ONI  
DEVAS FARI. NI NE SCIAS KIEL KONEKTI ĜIN AL NIA  
KOMPUTILO ...**





Elías Hernández Capdevila

# ĈU VI POVAS TROVI LA ERAROJN? KIEL KOREKTI ILIN?

de Dennis Keefe

Por bone scipovi Esperanton, necesas bone koni la regulojn, ĉu ne? Kaj por bone uzi tiujn regulojn, necesas lerni kiel rekoni erarojn de Esperanto, viajn kaj tiujn de aliaj Esperantistoj. En la sekvaj 38 frazoj estas neĝustaj uzoj de Esperanto. En tipa frazo estas kutime nur unu eraro, sed kelkfoje estas pluraj. Provu korekti ĉiujn frazojn. Ofte estas pli ol unu maniero bone ĝustigi la eraron, do ĉe la fino de la ekzerco, kie vi trovos la korektitajn frazojn, eble vi ne trovos ĝuste vian. La 38 frazoj baziĝas sur la 38 paĝoj de BEK-1, la Baza Ekzercaro-Kurso de Esperanto, trovebla ĉe [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info). En BEK-1 vi vidos, ke la eraro(j) en numero unu de la suba ekzercaro rilatas paĝon 1 de BEK; la eraro(j) en numero 30 rilatas paĝon 30, kaj tiel plu en la tuta ekzercaro. Bonan ŝanĉon!

1. -- Bonan matenon, kiel vi fartas?  
-- Bonan tago. Bone, kaj vi?
2. -- Vi estas en kurso de Esperanto?  
-- Jes, mi ĉeestas la lecionojn marde vespere.
3. -- Ĉu vi estas instruisto aŭ lernanto?  
-- Jes, mi estas lernanto.
4. -- Ĉu tio estas floro?  
-- Ne, tio estas ne floro.
5. -- Kio estas tio kaj tiu?  
-- Tio estas libro, kaj tiu estas botelo.
6. -- Ĉu la muŝoj estas sub la tablo?  
-- Jes, ili estas tie.
7. -- Kio estas ĉirkaŭ la lampo?  
-- La katoj estas ĉirkaŭ ĝi.

8. Estas kvar kato sub la tablo sur la bildo.
9. Kiom da lampo estas super la tablo?
10. Bonvolu donu al mi la panon kaj la tranĉilon.
11. Kiom da flava tasoj estas dekstre de la tablo?
12. -- Kiaj estas la muŝoj?  
-- Ili estas super la tablo, ĉirkaŭ la lampo.
13. Li surhavas blankan pantalonon kaj nigraj ŝuoj.
14. -- Kion faras Pablo?  
-- Pablo faras legas, kaj la libro nomiĝas Don Kiĥoto.
15. -- Ĉu Ramono skribas por poŝtelefono?  
-- Ne, li skribas por skribilo.
16. La muŝbatilo de Sinjoro Nopo estas en la dekstre de mano.
17. La ebrulo trinkas multe da ruĝan vinon.
18. Kiom personoj atendas la tramon? Ĉu kvar aŭ ĉu kvin?
19. Sinjoro Nopo, ne Petro, mortas la muŝojn.
20. Ĉu la botelo da la ebrulo estas malplena aŭ preskaŭ malplena?
21. Ĉu vi legas ĵurnalon ofta aŭ malofta?
22. Estas sepa kaj tri minutoj.
23. Je kio horo vi matenmanĝas kaj tagmanĝas?
24. Jes, lerni Esperanton plaĉas min multe.
25. -- Kiel Petro dormas nun?  
-- Li dormas nun, do estas la tria nokte.
26. La sciencisto surhavas okulvitrojn, do li vidas tre malbone.
27. La kurso de Esperanto komenciĝos post tri minutojn.
28. Kiam vi revenis al nia leciono de Esperanto? En la venonta semajno aŭ post du semajnoj?
29. Je kioma horo la filmo komencos kaj finos?

30. Mi pensas Esperanto estas facila kaj utila lingvo.
31. Kio vi pensas pri la ĉina lingvo?
32. Ĉu la profesoro scipovas la pola kaj rusa lingvoj?
33. Mi vekiĝis je la sepa. Poste tio mi matenmanĝis.
34. Aĉetis spagetoj kaj tomatan saŭcon la sinjorino.
35. Kio li kaj ŝi faras nun?
36. Ĉu vi povus pruntedonus al mi iom da mono? Eble kvin eŭrojn?
37. Kiu persono atendas la buson, kaj kio buso alvenas nun?
38. -- Kiujn ĉerizojn vi volas?  
-- Tiuj apud la bananoj.

#### Respondoj:

- 1) tagon (Mi deziras al vi bonan tagon. Hodiaŭ estas bona tago).
- 2) Ĉu vi estas . . . (Vi estas en kurso de Esperanto – Tia frazo NE estas demando. Ĝi estas aserto, do por fari demandon vi bezonas demando-vorton, ĉi tie, ĈU.)
- 3) Jes, Mi . . . (Oni ne respondas per JES aŭ NE se la frazo estas aŭdemando).
- 4) Ne, tio ne estas floro. (Oni metas la NE antaŭ la verbo. Se la NE estas en alia loko, kio teorie eblas, la senco ŝanĝiĝas).
- 5) . . . kaj tio estas botelo. (la vorto TIU povas indiki ankaŭ objekto, sed nur en konkretaj situacioj kiuj devas esti bone difinitaj).
- 6) Ne, ili ne estas tie. (Tiu respondo rilatas al la BEK-Kurso, BEK-1, paĝoj 6 kaj 7. Gramatike la supra respondo estas bona, sed ĝi havas eraron pri la konkreta situacio ĉi tie).
- 7) La muŝoj estas . . . (same kiel la klarigo en numero ses)
- 8) katoj (eraro pri pluralo)



- 9) lampoj (Vi povas diri "kiom da akvo", sed "kiom da glasoj da akvo." La vortoj glasoj kaj lampoj estas nombrebaj – 1, 2, 3, . . . , sed la vorto akvo ne estas tia: ĝi estas nenombrebla).
- 10) Bonvolu doni . . . (kiam du verboj apudas, nur la unua verbo varias en u, is, as, os, us, kaj u. La dua verbo finiĝas per nur -i)
- 11) flavaj (se la substantivo estas singulara, la adjektivo ankaŭ; se la substantivo estas plurala, la adjektivo same).
- 12) -- Ili estas nigraj, malgrandaj, ktp. (Kiaj? Grandaj, ruĝaj, longaj. Kie? Ĉirkaŭ la arbo. En la domo. Ktp).
- 13) . . . nigrajn ŝuojn. (La ŝuoj estas nigraj. Li aĉetis nigrajn ŝuojn).
- 14) Pablo faras legas. (Es como en español: ¿Qué hace Pablo? No se dice "Pablo hace lee" Se dice "Pablo lee, o bien, Pablo está leyendo").
- 15) per poŝtelefono, per skribilo. (Pablo skribas mesaĝon per poŝtelefono por sia amiko).
- 16) . . . en lia dekstra mano. (la dekstraj tasoĵ estas dekstre de la tablo)
- 17) multe da ruĝan vinon (Mi trinkis multe da varma kafo, aŭ, Mi trinkis multan, varman kafon).
- 18) Kiom da personoj . . . (Kiom da mono kostas la ĉemizo? Kiom da eŭroj kostas la ĉemizo? Kiom kostas la ĉemizo?)
- 19) . . . mortigas la muŝojn (La muŝoj mortis, ĉar Sinjoro Nopo mortigis ilin).
- 20) la botelo de la ebrulo (Li havas botelon da vino. La botelo de li enhavas vinon).
- 21) . . . ofte aŭ malofte (Li ofte legas. Lia legado estas ofta).
- 22) Estas la sepa . . . (Estas la unua, la oka, ktp).
- 23) Je kioma horo . . . (Je kioma horo vi matenmanĝas kutime? Je kiu horo vi matenmanĝas kutime: je la sepa aŭ je la oka? Kiom da horoj vi bezonas por matenmanĝi? Ĉu duonhoron = 30 minutojn? Ĉu trionhoron = 20 minutojn? Ĉu kvaronhoron = 15 minutojn?)

- 24) . . . plaĉas al mi . . . (Mi ŝatas lerni Esperanton. Lerni Esperanton plaĉas al mi.)
- 25) . . . ĉar estas la tria nokte (Komparu: Estas la tria nokte, do li dormas nun.)
- 26) . . . okulvitrojn, ĉar . . . (Komparu: Li vidas malbone, do li surhavas okulvitrojn.)
- 27) . . . post tri minutojn. (antaŭ tri minutoj, tri minutojn poste, post unu horo, post la komenco, ktp.)
- 28) Kiam vi revenos al . . . (Kiam vi alvenis al la leciono antaŭ unu semajno? Kiam vi kutime alvenas al la kurso? Kiam vi venos en la venonta semajno?)
- 29) . . . komenciĝos kaj finiĝos (La profesoro komencis la lecionon. La leciono komenciĝis. La gelernantoj finis la lecionon. La leciono finiĝis.)
- 30) Mi pensas, ke Esperanto . . . (Mi pensas, ke vi pravas. Mi kredas, ke li venos ĝustatempe. Mi opinias, ke tio estas bona.)
- 31) Kion vi pensas . . . (Mi pensas tion. Kion? Tion!)
- 32) . . . scipovas la polan kaj rusan lingvojn? (Li scipovas ilin. Li ŝatas ilin. Al li plaĉas ili.)
- 33) . . . poste tio . . . (poste = post tio, antaŭe = antaŭ tio, dume = dum tio).
- 34) Aĉetis spagetojn . . . (Spagetojn ŝi aĉetis. Ŝi aĉetis spagetojn. Spagetojn aĉetis ŝi. Ktp.)
- 35) Kion li kaj ŝi . . . (Vi faris tion. Kion vi faris? Tion!)
- 36) . . . povus pruntedoni al mi . . . (Donu al mi la tason = Bonvolu doni al mi la tason. Ĉu vi povas helpi min? Bonvolu helpi min. Tio estas la principo de du verboj apudaj).
- 37) . . . kiu buso venas nun? (Kio estas tio kaj tio? Tio estas busoj. Kiu buso iros al la centro de la urbo? Tiu buso. La unua buso. La unua.)
- 38) -- Tiujn apud la bananoj. ((Mi volas) tiujn ĉerizojn. (Mi deziras) tiujn.)

Dennis Keefe